



BARCELONA ESPERANTO-CENTRO

Basegoda, 40, 3^o, 1^a

ES-08028 BARCELONA, Hispanio, Eŭropa Unio

Telefono 93 333 80 81, barcelonaesperantocentro@yahoo.es

A T O M O
Junulara Sekcio de B E C



La 19an de septembro, okazis en la sidejo de Barcelona Esperanto-Centro "Casinet", la inaŭguro de la Esperanto-Kurso 2007-2008. Kiel invititoj partoprenis en la festo la samideaninoj el Rumanio Cristina Manu kaj Videla Pop de la urbo GHERLA kaj doktoro pri kemia inĝenierado Nagy Iosif el BUKAREŜTO kiu ankaŭ ĉeestis en la 13a Eŭropa Kongreso pri Bioteknologio en Barcelono. Sinceran dankon por ilia kunlaborado.

B E C - K O M U N I K O J

BEC-Estraro ricevis la jenajn kotizojn.

S-inoj : Karina Delatorre, Trinidad García, Nuria Gallés, Juanita Nadal kaj s-roj Javier Valero kaj Jesús Pérez. Antaŭdankon de la Kasisto.

Esperanto- Kursoj en "Casinet" strato Triadó 53

La aktuaka horaro estas la jena. Ĉiumerkrete superan kurson gvidas s-ro S. Aragay de la 19.00h ĝis la 19.45 h. Elementan kurson gvidas s-ro Manuel López de la 19.45 h ĝis la 21.00 h.

Kiel kutime la kursoj estas senpagaj.

92a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, JOKOHAMO, JAPANIO

1901 estas la aliĝintoj, el ili 57 komitatanoj kunvenis tri foje, kaj postulis dek horojn, por elekti la novan UEA-estraron k. a. organojn.

Sed meritas specialan mencion la giganta tasko de la pasinta UEA-estraro, kiu dun du periodoj estis gvidata de d-ro Renato Corseti. Koran gratulom kaj dankon al li por lia diligenteco, obstino kaj fervoro por Esperanto.

Evidente ankaŭ gratulon kaj bondeziron por la futura agado de la nova UEA-estraro prezidita de d-ro Probal Dasgupta. La Organiza Komisiono de la Internacia Esperanto-Semajno esperas ke la prezidanto de UEA aŭ iu alia estrarano, vizitos nin la venontan jaron.

59-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO

12 - 19.5.2007 - PARIZO

Regule ĉiujare en majo okazas la Internacia Fervoja Esperanto-Kongreso. Ĉi-foje ĝi okazis en Parizo kaj jam la kvinan fojon en Francio. La unua okazis ankaŭ en *Parizo* en 1951. Sekvis *Avignon* en 1969, poste *Perpignan* en 1988 kaj *Le Mans* en 1999.

La eventon partoprenis 271 gesamideanoj el 24 landoj. Dum la inaŭguro salutis la gekongresanojn *Renato Corsetti* por UEA, *Krešo Barkoviĉ* por SAT, *Bruno Flochon* por UFE, *Hubert Peyrouy* por SAT-Amikaro. Krom la oficialuloj de la fervojo la kongreson salutis ankaŭ la nepo de L.L. Zamenhof, s-ro *Jean-Christophe Zaleski-Zamenhof*.

Dum la kongreso okazis pluraj fakaj kunsidoj kaj prelegoj, gazetara konferenco, forumo pri movadaj aferoj, fervojaj novaĵoj, plenkunsidoj kaj du duontagaj ekskursoj. La unua gvidis nin per turisma trajneto al la fama monteto "Montmartre", kie troviĝas la baziliko "Sacre Coeur" - (Sankta Koro) kaj apuda placo de "Tertre". Tie troviĝas multaj pentristoj kaj kafejoj. La dua duontaga ekskurso temis pri krozado sur la kanalo "St. Martin", kie ni malkovris plurajn kluzojn kaj ŝipis sub la placo "Bastille". Alvenante al "La Villette", survoje ni admiris "la Geodon", muzeon de la muziko, iaman abatejon kiu estas transformita en ekspoziciejon pri sciencoj. Dum la tuttaga ekskurso oni vizitis la famkonatan kastelon kaj ĝardenon de "Versailles" kaj poste Francion miniature.

En la sama tempo estis ĉe Sejno, apud *Eifel*-turo, ekspoziciita rapidrekorda TGV-trajno. Eblis viziti kabinon, kie oni donis respektivajn klarigojn. Ĉiu vizitanto ricevis ĉapon kaj flagegon signitan per tiu evento. Dimanĉe mi havis eblecon vidi kaj aŭskulti travivaĵojn de la kondukisto de tiu TGV, kiu afable respondis ĉiujn demandojn. La Francoj tre fieras pri tiu eksterordinara atingo de rapideco de 574,8 km/hore.

Dum la tagordo de la publika plenkunsido estis legitaj estraraj raportoj, raporto de la ĉefkomitatano kaj de la faka komisiono, proponoj por la venontaj IFEF-kongresoj. Estis elektita nova estraro unuanime aprobita. Menciita estis Skisemajno kaj aliaj gravaj aferoj estis pritraktitaj. La programo estis abunda kaj preskaŭ ne restis tempo por libera diskutado. Trajnoj same kiel Esperanto alproksimigas homojn.

Okaze de tiu-ĉi kongreso estis eldonita speciala memorpoŝtmarko per kiu oni povis afranki leterojn aŭ poŝtkartojn kaj aldoni glumarkojn pri la evento.

Vesperaj programeroj, kiel kutime, estis dediĉitaj al kulturo. Dum la nacia vespero plezurigis nin folkloro grupo per diversaj dancoj kaj poste ni spektis grupon kiu prezentis kreolajn dancojn. Post la bankedo ni dancis laŭ la ritmo de latina muziko. En alia vespero ni povis sekvi vojon al "Santiago de Compostela" pere de diaporama prezento. Dum la distra vespero gitaris kaj kantis *JoMo* el Tuluzo por plezuro de ĉiuj partoprenantoj kaj dum la adiaŭa vespero ni babilis kaj trinkis elektitaĵojn en trinkejo.

La venonta, jubilea IFEF-kongreso okazos en Pollando inter la 17-a kaj la 24-a de majo 2008 en Poznano kaj la sekvanta estas planita en Triesto - Italio.

Liba G ABALDA

JUBILEA FESTO EN ANTVERPENNO - BELGIO

De vendredo la 25-an de majo ĝis lundo la 28-an majo la antverpena klubo La Verda Stelo festis sian 100-jariĝon. Ĝi estis granda evento kaj ebleco renkonti geamikojn. Kolektiĝis 185 partoprenantoj el pluraj landoj.

En la lernejo "O.L.Vrouw" oni akceptis la partoprenantojn kaj tie ankaŭ okazis ĉiuj vesperaj programoj. En la Esperanto-domo okazis prelegoj pri Amikumu - la interkona retejo, Vikipedio - la libera reta enciklopedio, pri historio de UEA, pri Esperanto en Israelo, Nederlando kaj Valonio, pri Memorlibro, seminario kaj trejnado ĉe Vikipedio.

Dum tiuj tagoj estis organizitaj vizitoj al la katedralo, al loĝejo de la fama pentristo *Rubens*, al Buĉista domo, promenoj tra la malnova urbo, promenado al novstile konstruita Juĝejo, kiu impresas pro sia vitra kaj grandioza aspekto. Por ŝatantoj de muzeoj estis abunda elekto da eblecoj: muzeo pri diamantoj, pri presarto, pri belaj artoj, pri ŝipnavigado, pri etnografio kaj aliaj. Interesa estis vizito al "Antverpeno en miniaturo", kie oni konatiĝas kun ĝia historio ekde antaŭ 20 000 jaroj. Dum aŭda prezento oni ricevas klarigojn pri diversaj partoj de la urbo kaj ties disvolviĝo.

Nove rekonstruita ĉefa fervoja stacidomo de la flandra urbo Antverpeno estis inaŭgurita pasintjare. Ĝi havas 4 nivelojn kaj 14 kajojn. Tio estas unikaĵo en la mondo. Nuntempe la trajnoj povas rekte veturi al Nederlando. Oni konstruis 1200 metrojn longan tunelon sub Antverpeno.

En la urbodomo okazis solena akcepto. La skabenino bonvenigis nin kun ĉeesto de la belecreĝino por Belgio dum la jaro 2007. Festparolis ankaŭ la prezidanto de la klubo, *Eddy Van den Bosch* kune kun *Ivo Durwael*. La solenaĵon ĉeestis la plej aĝa, 92-jara klubano, s-ro *Jules Verstraeten*, honora prezidanto de la klubo, aktivulo je loka, nacia kaj internacia niveloj. La urbodomo estas tre bela de ekstere kaj same de interne.

Dum la festkunsido estis honorigitaj ĉiuj membroj de la klubo kiuj kotizis pli ol 20 jaroj kaj memore ili ricevis libron pri historio de la antverpena klubo.

Sabate vespere okazis festa bufedo kaj poste, por plezuro de ĉiuj, koncertis *JoMo*. Kiel kutime li envicigis kantojn en 26 lingvoj kaj kantis dum pli ol du horoj seninterrompe. Poste li daŭrigis gitaro dum plia horo por dancigi partoprenantojn. La etoso estis tre plaĉa kaj varma. Dimanĉe vespere ĝojigis nin popolorkestro "*Ward De Beer*" per akordiona muziko. Samtempe oni instruis diversajn popolajn, sufiĉe viglajn, dancojn en rondo. Ĝi estis amuza kaj agrabla vespero.

La evento estis bone organizita, la manĝoj en formo de bufedo estis preparitaj de la organizantoj kaj volontuloj. Okaze de la 100-jara jubileo estis eldonita speciala poŝtmarko kun la kapo de *Rubens* kaj parto de la katedralo. En la Esperanto-domo funkciis la libroservo de FEL.

Ni havas nur bonajn impresojn pri tiu jubilea festo plena da ĝojo kaj gajeco.

Liba GABALDA

MODERNA PROBLEMETO

Antaŭ 20 jaroj pli-malpli, kiam la entreprenoj, fabrikoj kaj organizaĵoj en Eŭropo, komencis uzi komputilon ili konstatis, ke en sia alfabeto mankis kelkaj literoj. Ekzemple en la hispana lingvo ni ne povis skribi la literon (Ñ) kaj ĉiu persono solvis la problemeton laŭ sia kapableco.

Kiam mi ricevis la unuajn fakturojn aŭ listojn mi trovis skribita: **Espa?a, Catalu!a, casta&a** anstataŭ ol **España, Cataluña, castaña**. Dun la unuaj monatoj mi supozis, ke la sekretariino eraris sed konstatante, ke ĉiu dokumento ripetis la samam eraron mi konkludis, ke en la komputiloj oni ne povas skribi la literon (Ñ). Pasis jaroj kaj finfine la fabrikoj de la komputiloj enmetis en la klavaron la literon (Ñ) kaj ekde tiam oni povas skribi bone la hispanan alfabeton.

En la internacia lingvo Esperanto okazis simile. La geesperantistoj konstatis, ke en la programo kaj klavaro de la komputiloj ne permesas skribi la konsonantojn: **ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ, Ĉ, Ĝ, Ĥ, Ĵ, Ŝ, Ŭ**, pro tio ili sekvante la jenan rimarkon de la aŭtoro de Esperanto: **Presejoj, kiuj ne posedas la literojn: ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ, povas anstataŭ ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, u kaj verki leteron kun helpo de la konsonanto "h"**.

En la verko "**Linvaj Respondoj**" la temo n-ro 58 indikas: Pri la elekto inter **h** kaj la supersignitaj literoj. Laŭ uzado de **ch** ktp anstataŭ **ĉ** ktp estas enkondukitaj nur por la presejoj, **kiuj ne havas ankoraŭ literojn kun signetoj**, sed en skribado mi konsilas al vi ĉiam uzi pli bone **ĉ** anstataŭ **ch**,...

Meritas mencii, ke Zamenhof ĉiam eldonis siajn librojn kaj skribis sian korespondadon per konsonantoj kun supersignoj, "ĉ" malgraŭ la teknikaj malfacilaĵoj de la 19a jarcento. Ekzemple "La Unua Libro", "La Ekzercaro", la unua revuo en Esperanto "La Esperantisto" ktp.

Se mi mencias tiujn opiniojn, estas por la fakto, ke je la fino de la pasinta jarcento en la jaro 1980 pli-malpli, oni komencis aperi por la fabrikoj kaj komercejoj programo kiu permesas skribi komputile la supersignitajn literojn. Plie la jaron 2000 **Windows** lanĉis por la publiko la programon **WORD**, kiu tre facile permesas skribi la internacian lingvon Esperanto en interreto kaj retpoŝto.

Mi supozis, ke per la novaj programoj ĉiuj geesperantistoj perfekte skribos Esperanton, **sed tio ne okazis kaj nun ne okazas**. Kial? Ĉar multaj geesperantistoj ankoraŭ uzas malnovajn komputilojn. Ĉu ili ne scias ke ekzistas la programo **WORD**? Ĉu eble ne scias kiel uzi la programon? Ĉu ili ne deziras perdi kelke da minutoj por uzi la supersignitajn literojn?

La fakto estas, ke antaŭ du jaroj kelkaj gekursanoj de **BEC** decidis por faciligi la E-kurson sendi al mi persone kaj per interreto siajn tradukon kaj artikoleon. Kurioze nur du sendis perfekte la ekzercon, tamen la plimulto sendis sian laboron kun la helpo de la konsonantoj "**h**" kaj "**x**". Ekzemple: **manghi** aŭ **mangxi**.

Petante al ili kio okazas, oni informis min, ke ili ne posedas la programon **WORD**, aliaj posedas ĝin sed, ne scias kiel trovi la supersignitajn literojn. Por solvi la aferon ni decidis kun la helpo de unu lernanto tre kompetenta, instrui al aliaj la uzadon de la programo **WORD**.

Mi ne scias se en aliaj E-grupoj okazas la sama problemeto, sed estas evidente ke ankoraŭ nun aperas en la korespondado leteroj kaj retpoŝtoj en interreto kun la helpo de la konsonantoj "**h**" kaj "**x**". Laŭ mia opinio tiu situacio estas tute nefavora por la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto, ĉar ekster la E-agado multaj personoj konstatas tiun paradoksan situacion: **Multaj geesperantistoj ne uzas bone la alfabeton de Esperanto**. Eble unu solvo estus, ke en la fino de la Esperanto-gramatiko aperos elementa informadika kurseto kun la celo, ke la estontaj gekursanoj povos skribi sen erare nian internacian lingvon

Eble aliaj instruistoj posedas alian solvon por la menciita problemeto, mi estas preta interŝanĝi opiniojn kaj proprajn spertojn.

Salvador Aragaj

93a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
19-26 JULIO 2008 ROTTERDAMO, NEDERLANDO

Se vi pagas al peranto, bonvolu sendi ankaŭ la aliĝilon al tiu.

Se vi pagas rekte al la konto de UEA, sendu la aliĝilon al Roterdamo.